


12

JAPANA ĈERIZARBO

Prunus Serullata

 2011

La japana ĉerizarbo produktas ne ĉerizojn, sed puran belecon. La delikataj rozkoloraj floroj floras antaŭ ol la folioj aperas, transformante la arbon en unu grandan bukedon. En Japanio la efemera florado de la *sakura* estas celebrata ekde la 8-a jarcento dum la *Hanami-festoj*. En tiu periodo ĉiuj prenas libertempon kaj piknikumas kune kun la familio aŭ amikoj sur herbejo sub la floramaso, trinkante *sakeon*, la japanan rizvinon. Kvankam la florkrono de la ĉerizarbo ŝajnas plene pompi en ĝia beleco, per ĉiu venteto ĝi perdas kelkajn petalojn. Ĉi-tiu forblovado de la floroj estas metaforo por la homvivo mem: bela, sed mallonga. Pro la fakto, ke japana ĉerizarbo havas proksimume la saman vivdaŭron kiel homo (70 jaroj) kaj ke, kiel homo, ĝi povas morti ene de kelkaj tagoj, nur plifortiĝas ĉi-tiu komparo. Sed se la ideo de morto senkuraĝigas vin, memoru, ke la japana ĉeriza esenca oleo estas bona kuracilo kontraŭ streĉo. Kiel ofte en la naturo, la resanigilo troveblas proksime al la malsano ...



www.josvertelt.nl



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

